



PILO-PRESS Prezo 9,-- GM

Internacia
Informservo

Enhavo iel maldeca
Kovrilo draste
okulfrapa!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 23/1974 3 jul 1974
Aperas ĉiusemajne

Agadraporto pri la 1a jarduono 1974

Nürnberg. (pp) Multe da laboro por Esperanto, speciale informado en germana lingvo kaj en Esperanto, estis farita en la kadro de **INFORMCENTRO ESPERANTO NÜRNBERG (I C E N)**.

Estis eldonitaj kaj ekspeditaj:

- 22 numeroj de Internacia Informservo PILO-PRESS, ĉiu numero en eldonkvanto de 300 ekzempleroj.
- 12 numeroj de germanlingva informilo **ESPERANTO-NACHRICHTEN-DIENST (END)**, ĉiu numero en eldonkvanto de 500 ekzempleroj. Ricevantoj: 13 registaraj instancoj kaj ambasadoj en Bonn, 15 radiostacioj, 15 presagentejoj, 111 revuoj kaj gazetoj, multaj unuopuloj kaj Esperanto-grupoj.
- 3 Numeroj de **GERMANA ESPERANTO-REVUO**, eldonkvanto de ĉiu numero 2 000 ekzempleroj, n-ro 4/74 aperos dum julio.
- 1 Broŝuro "Die Einigung Europas und ihr Sprachenproblem" de d-ro Werner Bormann.

Estis enirintaj kaj prilaborintaj 1 100 leteroj, poŝtkartoj, inform-petoj kaj mendoj.

Pli ol 10 000 leteroj, poŝtkartoj kaj presaĵoj estis ekspeditaj.

Kelkaj centoj da interesuloj informiĝis pri Esperanto.

Pli ol 150 lernolibroj "Wir lernen Esperanto" kaj kelkiuj ekzempleroj de "Esperanto Programita" estis disvenditaj.

Pli ol 30 librovendejoj petis pri librokatalogoj resp. mendis Esperantolibrojn.

Ĉ. 400 personoj mendis Esperanto-literaturon, inter ili ankaŭ universitataj profesoroj, instruistoj kaj bibliotekoj.

Okazis tri literaturaj ekspozicioj.

Estis donitaj multaj leteraj kaj telefonaj informoj kaj konsiloj.

Oni povas konstati, ke kreskas la intereso por memlernado de Esperanto, sed en minimume 15 lokoj okazas Esperanto-kursoj. Kunlabore kun ICEN multaj unuopuloj faras valoran informlaboron en kunlaboro kun la loka gazetaro resp. per ekspozicioj aŭ disdonado de varbmateriale.

ICEN dankas al ĉiuj kiuj subtenis sian laboron per mondonacoj aŭ kuraĝigaj vortoj.

ICEN petas ankaŭ pri estonta subteno. Pro la plialtigo de la afrankokostoj la elspezoj bedaŭrinde denove grave kreskos. ICEN estas institucio kiu sin vivtenas ĉefe per servoj.

Donacojn oni sendu al: Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113
PSchK Nürnberg 819 56-851, Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579

Se vi ne jam abonis al PILO-PRESS, abonu nun por la dua jarduono 1974

Abonprezo por 1/2 jaro 20,- GM, Abonprezo de **GERMANA ESPERANTO-REVUO** 1974 por liberaj abonantoj 12,- GM.

Hier wäre Präsident Tito ganz Ohr gewesen

Esperanto-Kongresß im CCH mit 2000 Teilnehmern

Verständigungsschwierigkeiten wird es nicht geben. Denn 2000 Teilnehmer aus 49 Staaten, die sich am 27. Juli im Congress Centrum zum 59. Weltkongresß der Esperantisten treffen, sprechen die gleiche Sprache: Esperanto.

1887 vom polnischen Augenarzt Dr. Ludwig Zamenhof zum erstmalig propagiert, hat die „Lingvo Internacia“, die internationale Sprache, zwar einige hunderttausend Anhänger in aller Welt, die Welt hat sie sich bisher indessen nicht zu erobern vermocht. Die Esperantisten geben dennoch nicht auf.

Sie wurden im Laufe der Jahrzehnte belächelt, beschimpft, verfolgt und verboten, aber sie ließen sich nicht unterkriegen. Ohne für eine Abschaffung der nationalen Sprachen zu plädieren, möchten sie erreichen, daß Synchron-Anlagen und Dolmetscher in den internationalen Konferenzsälen überflüssig werden. Staatsoberhäupter sollen sich in Esperanto unterhalten und somit auch besser verstehen lernen. Ein Zukunftsbild freilich, denn zur Zeit spricht und versteht im Kreis der Regierenden allein Jugoslawiens Staatschef, Marschall Tito die Sprache der Welt.

Bundeskanzler Helmut Schmidt dagegen vermochte sich in seinem Geleitwort zum Hamburger Kongresß nur der deutschen Sprache zu bedienen, und auch Kongresß-Schirmherr Bundeswissenschaftsminister Rohde wird sich am 27. Juli übersetzen lassen müssen, was ihm seine Nachbarn im CCH auf Esperanto zu erzählen haben.

Die Hamburger Fremdenverkehrszentrale aber hat die Zeichen der Zeit erkannt. In farbfrohem Bilderprospekt jubiliert sie esperantistisch: „En Hamburgo estas la noktoj longaj“ (In Hamburg sind die Nächte lang), lobt den „Aptid la Ekstera Alsiso“ (Blick auf die Älster) und das „Covakuro en Horn“, das Galopprennen in Horn.

Elf Wissenschaftler aus elf Ländern eröffnen mit Esperanto-Vorträgen eine Sommer-Universität des Kongresses, die Liedertafel aus Siek gibt einen

Shantie-Abend in Esperanto, eine Theatergruppe aus Sofia spielt den „Barbier von Sevilla“ in der künstlichen Sprache und schließlich läuft ein in Paris gedrehter Krimi in Esperanto über die CCH-Leinwand.

Interessierter Gast wird Dr. Ingrid Seeler, Frau des Hamburger Finanzsenators, sein. Im Gespräch mit dem Mann braucht sie weder Dolmetscher noch Synchronanlage, sie ist seit ihrer Studienzzeit Esperantistin.

Esperanto — liebenswürdige Spinne rei einiger Außenseiter? Elisabeth Bormann, Pressereferentin des Deutschen Esperanto-Bundes, sieht es anders. „Nein. Wir glauben nach wie vor an die Zukunft dieser Weltsprache und wünschen uns eine internationale Verständigungsmöglichkeit.“

Immerhin kann Frau Bormann auf Erfolge aus jüngster Zeit hinweisen: Es besteht im Fachbereich Sprachen an der Hamburger Universität eine Esperanto-Lernmöglichkeit, es gibt Esperanto-Lehrstühle in Budapest und auf Teneriffa, Kurse in Fremdsprachen- und Volkshochschulen, eine umfangreiche Esperanto-Literatur und Kontaktmöglichkeiten für Esperantisten in aller Welt.

Nur ein halbes Jahr, verspricht Elisabeth Bormann, braucht man in das Studium dieser Sprache zu investieren, um sich verständigen zu können. Nach einem Jahr sei man schon in der Lage, wissenschaftlichen Vorträgen zu folgen.

Wer weiß, ob Hamburg nach dieser Empfehlung nicht dreisprachig wird ab August: Plattdeutsch, Hochdeutsch und Esperanto?

Damit Sie, lieber Leser, sich schon einmal ein Bild von der als „Weltsprache“ propagierten Verständigungsmethode machen können, nebenstehend ein Auszug aus dem Hamburg-Prospekt in Esperanto. (Darunter diesmal zur Sicherheit noch dem deutschen Klartext.)

ALWIN BELLMANN

Verstehen Sie alles?

Hamburgo invitas al promenado: Ĉirkaŭ la Ekstera Alster tra verdajoj. Aŭ estas la „ĉefa“ promenovojo de Ovelgandio al Schulau, kie freza vento blovas vian naŝon, kie vi povas pikniki en la „ĉefa“ el la vastaj parkoj cele al la deklivo kun panoramo al la rivero kaj la sipoj.

Planten un Blumen valoras posttagmezon, la granda arboregnaĵo kaj ĝardeno estas la ĉefa gardon al Hamburgo de la supre oferias la televidita turo kun sia turnigata restoracio. Ankau foje iru al Hagenbeck: Ĝiaj elefantoj rigardas sultantajn defenojn — kaj lasu viajn infanojn gislacige petoli sur la ĵudejoj!

So heißt es auf deutsch

Hamburg lädt ein zu einer Promenade durch Grünanlagen rund um die Außenalster. Oder auf dem Elbe-Wander-Weg von Ovelgand bis Schulau, wo frischer Wind um Ihre Nase weht, wo Sie in einem der großen Parks am Elbhang mit dem Blick auf Fluß und Schiffe picknicken können.

Planten und Blumen der große Freizeit- und Ruhepark mitten in der Stadt, beansprucht einen Nachmittag. Den Blick auf Hamburg eröffnet der hohe Fernsehturm mit seinem rotierenden Restaurant. Es lohnt sich auch, einmal nach Hagenbeck zu gehen: Elefanten zu füttern, springende Delphine zu beobachten und — lassen Sie Ihre Kinder bis zum Müdewerden auf den Spielplätzen spielen.


Hamburger Abendblatt, Bild-Zeitung kaj Die Welt jam detale raportis pri la preparoj al la 59a Universala Esperanto-Kongreso. En sia eldono de la 29.6.74 "Die Welt" skribas grandlitere: "Prominenz verbeugt sich vor dem Esperanto-Kongresß" (Eminentularo riverencas antaŭ la Esperanto-Kongreso). La artikolo speciale elstarigas la salutmesaĝon de kanceliero Schmidt.

Socialisma Internacio salutas la kongreson

La prezidanto kaj la ĝenerala sekretario de la Socialisma Internacio, Bruno Pittermann resp. Hans Janitschek, transsendis salutmesaĝon por la 59a UK.

Bonaj preparoj en Kronach

Kronach (pp) La loka gazetaro de Kronach publikigis ĵus ampleksajn informojn pri la sukcesaj preparoj por la Postkongreso. Aliĝis ĝis nun centoj da partoprenantoj el FRG, Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Kanado, USONO, Francio, Greklando, Finnlando, Nederlando, Pollando, Svedio, Israelo, Sovetunio kaj Japanio. La malsupra foto el "Neue Presse" Kronach montras la lokajn esperantistojn dum kongresa preparkunveno:



Kronacher Esperantisten treffen sich regelmäßig an den Mittwoch-Abenden im Katholischen Vereinshaus Kronach. Hier bei einer Besprechung der Kongressvorbereitungen. Im Bild von links, Studienrat Walter F.J. Walther, Lehrerin Maxi Daum, IBM-Programmierer Ludwig N. Bobel, Fräulein Atta Denninger, Computertechniker Manfred Danner, Oberstudienrat Armin Grötzer vom Kaspar-Zeuß-Gymnasium. NP-Foto

Loĝiga situacio de la 30a IJK

Münster(ub) Pro eksterordinare granda kvanto de ĝisnunaj aliĝoj al la 30a Internacia Junulara Konferenco ek de la 2.7.74 ĝiaj disponeblaj kapacitoj estas plene okupataj, kaj oni ne plu eblas akcepti novajn aliĝantojn.

En Münster montriĝis malfacilaĵoj ĉe loĝigo surprize grandaj kaj sekve de ili oni bedaŭrinde al lastminutaj aliĝontoj ne povos garantii tranokteblecojn. Ĉiuj postaliĝontoj venu al Münster je propra risko kun anticipa sciigo ke ili mem devos zorgi pri la loĝejo ekster la 30a IJK. En la rezervado LKK volonte pretas helpi, sed atentigas ke en junulargastejo en Münster dum la feria tempo oni ne akceptas grupojn sed nur unuopulojn. Por tiuj ĉiuj ne pli frue sendis aliĝilon nun oni krome povas rekomendi pensionojn kaj hotelojn en Münster aŭ kelkajn tendumejojn en la ĉirkaŭaĵo. LKK tamen klopodos prizorgi manĝojn por malfruiĝantoj.

Favora voĉdono al Esperanto

Perpignan (rlw) La ĝenerala konsilio de la franca departemento Orientaj Pireneoj (Provinco Ruziljono) okaze de ĝenerala asembleo la 6an de junio 1974 en la Prefektejo de Perpignan voĉdonis la sekvantan deziresprimon:

"La ĝenerala konsilio demandas al la franca registaro:

- 1) preni la decidon instrui la internacian lingvon "Esperanto" kiel helplingvo, en ĉiuj publikaj lernejoj de la ŝtato.
- 2) formi instruistojn de Esperanto organizante kursojn kaj stagojn por tiuj instruistoj.
- 3) ŭzi televidon kaj radion por ĝenerala instruado de Esperanto".

La deziresprimo estas sendita de la Prefekto al la Franca Ministro de Edukado.

Portreto

La visitanto Richard Wood



Er ist ein Weltreisender in Sachen Weltsprache und Sprachen auf der Welt. Der junge Wissenschaftler aus Schottland, der jetzt im Staat New York als Professor lehrt, kennt, versteht und spricht sogar einige der Sprachen, für die es kaum ein Lexikon gibt und die auf fernen Inseln im Pazifik oder vor Mittelamerika wie einsame Blüten als eigene Gewächse entstanden sind. Mit dem Tonband reiste Prof. Richard E. Wood dorthin, um diese Sprachen zu sammeln. Die Erträge hat er als Mitverfasser eines Buches über Pidgin und Kreolische Sprachen eingebracht.

Aber nicht nur den Raritäten auf kleinen Sprachinseln widmet sich der junge Professor, sondern ebenso einer Sprache, deren Vertreter sich wünschen, daß sie die allgemein verständliche schlechthin werden soll. In ihrem Namen kam er als Besucher zur Saar-Universität. Der Besucher, die visitante, verständigte sich mit seinen Saarbrücker Gastgebern auch ausschließlich in dieser Sprache: Esperanto. Mit elf Jahren schon, so erzählt er, hat er angefangen, aus Interesse an der Struktur dieser Kunstsprache Esperanto zu lernen. Nun lehrt er sie weiter.

Ein Abzeichen mit einem fünfkehligen Stern am Rockaufschlag weist ihn als Esperantisten aus und zwei Ringe jeweils als Weltreisenden. Am Ringfinger der rechten Hand trägt er einen Ring aus Mexiko, an der linken Hand ein Stück europäisches Kunsthandwerk, einen Ring, erworben im Deutschen Museum in München. In der bayrischen Hauptstadt verbringt Prof. Wood derzeit einen sechswöchigen Studienaufenthalt. zi./Foto: Hartung

Okaze de la restadode prof. d-ro R.E. Wood en Saarbrücken aperis en Saarbrücker Zeitung de 25.6.74 interesa portret-felietono.

Pilo-Press en la bervalia ministerio

En la oka epizodo sub la titolo "Kiel Kleopatra helpis Cezaron konigi Esperanton al alia generalo" de la ĵus aperinta libro "El la vivo de bervalia sentaĝulo" ni legas:

"Mi ŝvitis super mistera naŭlitera vorto signifanta "plej danĝera, se ĝi estas pala", kiam la interparolilo ĉirpis en mia ministeria oficejo. La ĉefo alvokis min.

- Jes, sinjoro direktoro. Mi tuj venos. Mi forŝovis la interrompitan krucvortenigmon, reenŝutigis miajn piedojn kaj, kaptinte mian jakon de seĝodorso, rapidis al mia superulo.

Li geste invitis min sidigi en profunda fotelo, dum li mem nerveze rondiris ĉirkaŭ sia skribotablo, sur kiu kuŝis la lasta numero de "Pilo-Press". Post distingita tuseto li atakis la temon.... "

Antaŭ la finalo

En sia lasta numero Pilo-Press skribis: "unu el la plej interesaj ludoj en tiu raŭndo certe estos la 3an de julio en Frankfurto inter Pollando kaj FRG." Kaj fakte ĝi estis interesege, unika ludo, ne nur pro la akvo-amaso sur la ludplaco. La ludon decidis la hazardo, kiu ebligis al Müller ŝoti en la 30a minuto de la 2a duontempo la decidan golon. Tiele FRG ludos dimanĉe kontraŭ Nederlando en la finalo. Kaj Pollando kaj Brazilo ludos sabate pri la 3a resp. 4a loko. La pola teamo sendube estis la surprizo de la 10a Monda Futbala Turniro. Per pli da bonŝanco ili estus povintaj akiri la rajton je la finalo.

Jerzy Grum, la futbal-reportero de la Esperanto-redakcio de Pola Radio, nomis sian komenton pri la ludo "Bonŝanco ne ĉiam favoras la pli bonajn". Li diris i.a!...mi estas sub tute freŝa impresado de la ĵus finiĝinta matĉo inter la reprezentantaroj de FRG kaj Pollando. Mi rigardi tiun matĉon en la televido kune kun milionoj da homoj kaj kune kun ĉi tiuj milionoj da homoj mi scias, ke la hazarda venko 1:0, kiun la teamo de FRG atingis super la teamo de Pollando, tute ne redonas la trapason de la matĉo. En la futbalo bonŝanco kutime favoras la pli bonajn, ĉi-foje forlasis la ludoplacon venkite la teamo kiu en tiu turniro estis pli bona ol la rivalo...."

Tapso kaj Tipso en Esperantujo

Tapso: Ĉu vi scias ke ni jam estas famaj?

Tipso: Jes, ni estas famaj marionetoj. Ni jam furoris en Esperanto-anguleto de Pola Radio!

Tapso: Sed la Esperanto-Ekspreson ni ne jam atingis. Ni devas pli diligente lerni Esperanton por kapti ĝin!